Kiamaniere amatoroj fortiĝu? Dua parto (Rekomendo de USIKUBO 9p)

Mi skribis, ke por plifortiĝi amatoro plej bone estu instruata de forta profesiulo. Tamen la nombro de amatoroj en Japanio, kiuj estas benitaj kun tia medio, estas tiom malgranda, ke estas preskaŭ escepta. Ordinare vi devas sole studi.

Rememoru mian antaŭan skribaĵon, ke en komparo inter {HON-IN-BOU} Syuuei kaj modernaj profesiuloj, mi diris, ke modernaj profesiuloj estas teknike pli progresintaj, sed Syuuei estis pli forta en baza fizika kapablo ol ili.

Vi povas interpreti miajn vortojn 'tekniko kontraŭ baza fizika kapablo' kiel 'strategio kontraŭ taktiko', aŭ 'povo por juĝi kontraŭ povo por legi' aŭ 'kono de esencaj metoj kontraŭ povo por legi'. Tio estus ne logika, tamen vi povus kompreni kiom mi volas esprimi.

Estas neeble por amatoroj memstare atingi povon por juĝi kaj konon de esencaj metoj. Ne estas alia maniero ol lerni ilin per libroj kaj revuoj. Renverse dirante, se vi lernas, vi povos atingi. Eĉ se post mezaĝa, vi plu lertiĝos en ĉi tiu flanko.

Sed la povo por legi ŝajnas baza fizika kapablo, kaj estas tute alia ol povo por juĝi aŭ kono de esencaj metoj. Verdire, vi devus ekzerci ek de via infanaĝo por kreski la kapablon. Tial neeblas fariĝi profesiulo, kiam vi estas matura. Se vi demandas, kiu gajnas en go-ludo, tiu kiu elstaras en strategio kaj juĝo aŭ tiu, kiu elstaras en taktiko kaj legado, ĝi estas la lasta. Eĉ se la strategio estas malbona, venkas tiu, kiu havas pli fortan kapablon por legi.

Por amatoroj studi memstare, estas konsilinde unue lernu pri juĝado de bonaj/malbonaj metoj kaj pri esencaj metoj per libroj aŭ revuoj. En rekta proporcio al viaj klopodoj, vi certe pliboniĝos videble.

Tamen, por vere atingi kapablon en go-ludo, por plilertiĝi, vi kresku la povon por legi. Por fari tion, kiel oni ofte diras, vi devas solvadi '{Sinvivigi/Mortigi} go-problemojn'. La celo de solvadi go-problemojn estas evoluigi la kapablon por legi. Iuj homoj opinias, ke la celo de go-problemo-solvado estas parkerigi 'esencajn metojn', sed la origina celo de go-problemo-solvado estas evolui la bazan kapablon por legi. Vi devus trejni vin legi ĉiujn variojn en facilaj problemoj.

Trejnado por evolui bazan kapablon (por legi, per solvado de go-problemojn) ne estas interesa. Tamen, la diferenco inter forta kaj malforta goistoj, inter profesiuloj kaj amatoroj, estas finfine en la diferenco en kapablo por legi. Supozu ke profesiula-kandidato ludas kun amatora gubernia ĉampiono. Eĉ se profesiula-kandidato malsuperas en strategio, ĝi superas en kapablo por enparte tralegi {, kaj venkos la ludon}. Se ne, ĝi ne estu profesiula-kandidato.